40
Birštonas, Litovio
BET

# Meandro 7

## Ĉiutaga informilo de BET- 40 en Birštonas

* Sabato *  2004.07.17

## HODIAŬ

### Sabate, la 17an de julio

**07:00-08:00** Jogo (por dezirantoj, en la sportista komunloĝejo. Gvidas *Ĉielo*)
**08:00-09:00** MATENMANĜO
**09:00-12:45** Diplomiga seminario de IEI. Gvidas Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos (salono de urba magistrato)
**09:30-11:00** Paroligaj kaj perfektigaj kursoj (E. Bondar en 200, S.Trenner en salono de apuda domo, N.Pietuchowska en 305)
**9:30-13:00** FOIRO de popolaj metioj (ĉe fontano)
**11:00-12:00** BEF: Libera tribuno (en 204)
**12:00-13:00** BEF: Konkludoj. Decido pri la sekva Forumo. Fermo (en 204)
**13:00-14:00** TAGMANĜO
**14:30-15:30** SOLENA FERMO DE BET-40 (en la kulturcentro)
**15:30-17:20** Diplomiga seminario de IEI. Gvidas Atilio Orellana Rojas kaj Ana Montesinos (salono de urba magistrato)
**16:00-18:00** Libera tempo
**18:00-19:00** VESPERMANĜO
**20:00-21:00** Internacia vespero. Koncerto (en la kulturcentro)
**21:00-22:00** Adiaŭa vespero (en salono de apuda domo)

## MORGAŬ

### Dimanĉe, la 18an de julio

**07:00-08:00** Jogo (por dezirantoj, en la sportista komunloĝejo. Gvidas Ĉielo)
**08:00-09:00** MATENMANĜO
**13:00-14:00** TAGMANĜO
**18:00-19:00** VESPERMANĜO

### INTERNACIA VESPERO

Se vi intencas prezenti programeron en bunta progrtamo de internacia vespero. Bonvolu skribi vian nomon, kion vi prezentos, kaj donu informojn al Aida Čižikaitė, respondeca pri kultura programo. Klopodu kiel eble plej vaste prezenti vian landon kaj montri al neesperantista publiko, ke nia lingvo ligas homojn kaj kulturojn.

### ATENTON!!!

**FORVETURO**

Ĉiuj busetoj Birštonas-Kaunas, la 18an de julio, dimanĉon, forveturantaj al Kaunas, haltos ĉe la sanatorio VERSMĖ. Busetoj veturas ĉiun duonhoron.

**ŜLOSILOJN**

Antaŭ ol foriri hejmen, NE FORGESU redoni ŝlosilojn.





▲ H.Gorecka prelegas pri “Lev Tolstoj kaj Esperanto”.



▲ Spektado de la pupteatraĵo “La Ora Ovo”.



▲ Nora Caragea gvidas lingvajn ludojn.



▲ Kurso de Ewa Bondar.



▲ Litova Nacia Vespero: koncertas “RASKILA”, ensemblo de popolaj kantoj kaj dancoj.



▲ Matenan jogon gvidas *Ĉielo.*



▲ Alfredas Maruška prelegas pri SUĜOK-terapio.



▲ Litova Nacia Vespero.

## FOTOAMATORA RENKONTIĜO

Hieraŭ okazis fotoamatora renkontiĝo. Mallonge ĉiu partoprenanto prezentis sin. Andrzej Sochacki ekspoziciis multe da fotoj el diversaj Esperanto-aranĝoj. Ilona Ejsmont ne alvenis al BET, sed ŝia patro alportis ekspoziciaĵojn de ege interesaj artofotoj. Kelkaj el ili estas belaj vojaĝ-memoraĵoj.

Kelkaj samideanoj el la partoprenantoj estas aŭ estis profesiaj fotistoj. Irja Miettinen laboris kiel portretofotistino pli ol 30 jarojn, kaj eĉ antaŭ pli ol dek jarojn estis elektita dum Budapeŝta UK kiel prezidantino de la faka asocio de fotistoj.

Dum intereŝanĝo de opinioj pri fotado kaj Esperanto aperis jenoj: 1) Organizi foto-ekspozicion dum 90a UK en Vilnius kaj anonci konkursojn; 2) Inviti samideanojn viziti kaj partopreni en @-ekspozicioj: *http://www.silverpointmedia*; *http://www.esperanto.pl/galerio*); 3) Fondi aŭ plej bone renovigi agadon de la malnova faka asocio. Pri tio partoprenantoj komunikos kaj diskutos rete; 4) Estis farita nomlisto de la fotista grupo (akirebla en la akceptejo aŭ ricevebla interrete ĉe *am@centras.lt*. — *A. Maruška*

## RENKONTIĜO de SUĜOK-emuloj II

D-ro A.Maruska daŭrigis instruadon pri sanhelpo pere de korespondaj sistemoj en piedoj kaj manoj. La instruado konsistis el klinikaj ekzemploj, teoriaj informoj kaj praktika serĉado de la korespondaj zonoj kaj punktoj. Kelkaj partoprenantoj sukcesis sperti bonan tujan efikon. Metodo estas 100-procente efika, kiam oni havas ĵus aperintajn perturbojn. Dolorajn kronikajn malsanojn oni devas kuraci pli longe kaj oni bezonas pli profundan studadon de la Suĝok.

Vidante grandan intereson kaj kredon pri metodo, d-ro A.Maruška proponas esperantlingvajn diversnivelajn Suĝok-kursojn en loĝloko de interesiĝantoj. Konsultado, informado kaj demandoj pri kursorganizado eblas rete: *am@centras.lt* — *A.Maruška*

## MEDICINISTA EKSKURSO

Grupo de medicinistoj hieraŭ havis ekskurson al rekapabliga hospitalo "Versmė" kaj sanatorio "Tulpė". La anoj vizitis kuracoĉambrojn de traŭmatologia kaj neŭrologia fakoj de "Versmė", vidis akvoterapiajn ejojn dum apliko de ŝlimo, subakvaj masaĝoj. "Versmė" havas 350 lokojn por gravaj malsanuloj, kiuj daŭrigas kuracadon post hospitaloj el diversaj lokoj de Litovio. Parto de pacientoj venas el aliaj landoj (Pollando, Danio, Israelo...).

Sanatorio "Tulpė" havas 150 lokojn. Ĉi tie alvenas homoj el diversaj landoj. Nuntempe ĝi estas preskaŭ plene okupita de pacientoj el Israelo.

Antaŭ unu jaro, renovigita estas akvoterapiejo, kiun konstruis "Ruĝa Kruco" en 1926. Nun tie estas mineralakva baseno, turka saŭno kaj aliaj.

— *A.Maruška*

## SALUTMESAĜO al BET-40



Kun granda plezuro mi salutas la partoprenantojn de la 40-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj. Mi estas certa, ke la tagoj en Birštonas flugis rapide sen mortaj momentoj, ĉar tiel riĉa estis la programo de tiu ĉi jubilea BET.

Certe dum tiu ĉi semajno oni multfoje parolis ankaŭ pri la 90-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu post unu jaro disvolviĝos en la litova ĉefurbo. Ĝi estos jubilea ne nur pro sia ronda ordonumero sed eĉ pli pro tio, ke la 90-a UK markos la 100-jariĝon de la impona tradicio de Universalaj Kongresoj. Baltian Esperanto-agadon oni apenaŭ povas plu imagi sen BET, ĉar tiel firme tiu tradicio jam enradikiĝis, kaj la tutmonda Esperanto-movado neniel estas imagebla sen UK. Universala Kongreso fariĝis la vera flagŝipo de Esperanto. Post unu jaro miloj da esperantistoj el ĉiuj anguloj de la Tero ankros ĝin en Vilno.

Kvankam Vilno unuafoje rolos kiel ĉefurbo de Esperantujo, UEA povis kun plena fido komisii al ĝi tiun taskon, la plej grandan taskon, kiun la Esperanto-movado povas doni. Litovaj esperantistoj ne estas komencantoj en organizado, sed ili kolektis multe da spertoj interalie per organizado de BET-oj.

La ĉi-jara BET ricevis apartan gravecon ne nur pro sia jubileo sed ankaŭ pro tio, ke apud la kongreso de IKUE ĝi iĝis kvazaŭ malgranda ĝenerala provo de UK. Mi estas certa, ke tiu provo sukcesis, kaj mi estas same certa pri nova brila sukceso, sed en multe pli granda skalo, post unu jaro en Vilno.

*Osmo Buller*
*Ĝenerala Direktoro de UEA*

LITOVA STELO

## ADIAŬA VORTO

La programo de nia BET elĉerpiĝis kaj vi tenas en la manoj jam la lastan MEANDRON. La redaktantoj strebis, ke vi konstante havu bezonajn informojn. Feliĉe, grandaj ŝanĝoj ne okazis kaj la programo estas plenumita je 90 %. Dankon al ĉiuj, kiuj laŭ siaj eblecoj kaj povoj kontribuis al nia aranĝo.



Ni esperas, ke vi forportos el Birštonas bonajn impresojn kaj la urbeto ĉiam memorigos al vi Litovion. Same ni esperas, ke post unu jaro ni denove renkontiĝos en Vilnius kaj vi konatiĝos kun nia ĉefurbo ne nur laŭ turismaj prospektoj ricevitaj ĉi tie.

Do sukcesan revenon al viaj hejmoj kaj pluan aktivan laboron por nia komuna afero. Ĝis la revido en 2005!

— *La organizantoj de BET-40*

## Ĉiu numero de MEANDRO en retejo

Ĉiu numero de "MEANDRO" en la formo de PDF-dosiero baldaŭ legeblos en la retejo de Litova Esperanto-Asocio: *http://www.esperanto.lt/bet/*. Ankaŭ rigareblos pli da fotoj por agrabla memoro.

Kiu volas ricevi en granda formo fotojn aperintajn en ĉiu numero de MEANDRO kaj en la retejo, bv. skribi al CHOE Taesok per la retpoŝto: *ds@chojus.com*. Li sendos ilin nur per retpoŝto.

## DANKON!

Ĉio kio komenciĝas, tio ankaŭ finiĝas. Jen la fino de BET-40 alproksimiĝas kaj baldaŭ ni ĉiuj disiros. Dank' al bonaj organizantoj ni pasigis ĉi tie harmoniajn tagojn en Birštonas kaj espereble venos hejmen kun novaj inspiroj kaj laboremo por Esperanto.

Dankon al la kunlaborantoj por BET-40 kaj "iki pasimatymo Vilniuje" (ĝis la revido en Vilnius) en 2005. — *Hans Jankowski (Germanio)*



Redaktoroj: Petras ČELIAUSKAS, CHOE Taesok